MONATA INFORMILO - JARO I-Nro. 03/86 - PORTO ALEGRE - Cz$2,00

KONTAKTILO

MONATA INFORMILO DE
ESPERANTO SOCIETO DE PORTO ALEGRE

JUNIO DE 1986

SALUTOJN!

Jen nia tria numero.

Ĝis nun, ni atendas vian helpadon, viajn leterojn, sugestojn, ktp.

Ekstere kaj ĉi tie la mondo vivas mondpokalan etoson (malgraŭ Brazilo ne estas plu konkuranto), ĉiutage oni vidas kaj aŭdas ludaĵojn.

Sed nia lando, ŝajnas al ni, ŝanĝiĝas.

Kion vi pensas pri la kruzadoj? Ĉu vi rimarkis ke oni vidas multe da aŭtomobiloj sur la stratoj? Ĉu vi rimarkis ke nuntempe la personoj tre aĉetas? Kio okazas? Ĉu vi kredas pri Ekonomika Reformo?

Paroli pri modernaj kaj nuntempaj Brazilaj aferoj estas bona oportuno por praktikadi la lingvan uzadon de Esperanto, tial ni vokas vin por skribe opinii. Ni atendas viajn ideojn, do, skribu al ni vian penson. Ni tre ŝatus publikigi vian leteron.

DOKTORIĜO

Je la 16ª de junio, ĉe la Federacia Universitato de Rio de Janeiro, la nuntempa Profesoro de Esperanto ĉe Federacia Universitato de Juiz de Fora Prof. José Passini, defendis sukcese sian tezon pri Esperanto kaj doktoriĝis ricevinte la maksimuman noton de la ekzamenistoj, inter kiuj estis la eminenta akademiano Prof. Geraldo Mattos, el Curitiba.

ESPA, pere de sia bulteno, elkore kompl imentas la Prof. José Passini pro lia doktoriĝo.

EKSTEORDINARA NOVAĴO !

Oni sciiĝis ke en ŝtato Amazonas Lernejo inkludis Esperanton kiel lernobjekton de la 5ª ĝis la 8ª klasoj, unu leciono po semajne, po klaso. Tio okaz is dank' al klarvido de ties urbestro, kaj instigo de la direktoraro de Rorajma Esperanto-Asocio.

Gratulinda kaj sekvinda iniciato. (Pref. Municipal de Pres. Figueiredo - AM - BR 69735/ Rorajma Esperanto - Asocio Caixa Postal, 61 BR 69300 - Boa Vis ta - RR)

(Laŭ notico ĉe Brazila Esperantisto-Jan/Feb/Mar/86,nº 288)

Aĉeteblas ĉe nia sidejo la disko de Flavio Fonseca en Esperanto kaj kover toj surstampitaj per esperantaĵo alude al centjariĝo.

Ilin aĉetu kaj tiel vi kontribuos kun nia Societo.

FRITAĴO DE KAROTO

Ingrediencoj:

4 tasojn da karoto kuirita
2 kulerojn (supo) da butero fandita
1 kirlitan ovon
100g da tritika faruno
1 tason da krakena faruno
oleon
petroselon, salon kaj pipron laŭplaĉe

Kiel fari:

Knedu la karotojn.

Spicu laŭ via gusto kaj almetu ovon, buteron kaj tritikan farunon.

Miksu bone.

Aldonu al pasto karotan formon.

Pasigu ilin en krakena faruno kaj enmetu en glacisŝranko por proksimume du horoj.

Poste, ilin fritu en varmega oleo ĝis ke ili igas rostitaj. Metu sur sorba papero.

Ornamu ĉiun fritaĵon per branĉeto de petroselo.

TRADICIO...

Pasintmonatan bultenon ni ekparolis pri la festeco de junio kaj nun ni plue parolas tion.

Je la 24ª kaj la 29ª de junio oni festas, respektive, la tradiciajn Tagojn de Sankta Johano kaj Sankta Petro; oni festas kun ĉion, kion oni rajtas: Ekde fajrejo ĝis rostitaj arakidoj. Bedaŭrinde la modernemeca hodiaŭa generacio ne kultivas tiajn bonajn naivajn distrajĵojn. La maljunuloj (sed ne tro me!) memoras la plaĉan paroladon ĉe la fajrejo atendantaj la pretigo de la vinspicitaĵo, dum apude infanoj bone ŝirmitaj per lanvestoj ŝmace manĝis krevigitan maizon.

Profitante la junian etoson, en la pasinta jaro nia samideano Afonso Camboim el Paraiba, kunigis la anojn de Kunigilo-Esperanto Klubo kaj prezentis kvadrilon fare de paroj laŭnacie montrataj de siaj buntvestoj, kiuj dancis en difinitan popolalokon disvastigante Esperanton per folkloro.

Kial ni, la gaŭĉoj, kiuj havas riĉan folkloron ne prenas la ekzemplon kaj reorganizas grupon por tiaj prezentiĝoj? La nura problemo vidata de ni estas ke kiam oni havas ideon pri vigligo ĉiuj apogas kaj aldonas: realigu, do.

Fakte, ial la personoj ne deziras kompromisiiĝi. Ĉu por ne esti kritikataj?

Oni riskas ne plaĉi al ĉiuj!...

SUGESTO - KONSTITUCIO

La nova Respubliko proponas renovigi ĉion: anstataŭ kruzejro, kruzado; nova ekonomia sistemo kaj eĉ nova konstitucio por anstataŭigi la jam kadukan flikitan Konstitucion, kiu ĝis nun validas.

Ĉiam zorgema pri aktualaj okazaĵoj en - kaj eksterlande, nia plejofta leganto kaj apoganto, sro. G. O. Vaske, el S.Sebastião do Kai, sugestas ke "ĉiu leganto sentu sin ŝulda sendi almenaŭ telegramon, nacilingve, al COMISSÃO de CONSTITUIÇÃO do SENADO FEDERAL."
"COMUNIDADE GAÚCHA ESPERANTISTA SOLICITA SENHORES CONSTITUINTES INCLUIREM PARÁGRAFO CONSTITUIÇÃO FAVOREÇA FLORESCIMENTO IDIOMA INTERNACIONAL ESPERANTO NO BRASIL PARA AJUDAR GARANTIA PAZ MUNDIAL."

Jen lia sugesto kaj ni reliefigas, eble ne estus necese, la gravecon de tia iniciato.

NACIA KONGRESO

KIAM? 16ª ĝis 20ª/07

KIE? CURITIBA

KIEL ALIĜI? Skribu al Paraná Esperanto Asocio (Strato: Dr. Muricy, 542 Ĉambro: 1201 80.001 - Curitiba-Paraná), pagu la kotizon de CZ$106,40 plus CZ$50,00 se vi deziros la komunan loĝejon.
Kontaktiĝu kun nia redakcio ĉar ni intencas organizi vojaĝgrupon kaj eliri el POA je la 15/07.

KIEL DIRI:

- Há muito tempo não o vejo:
  De longe mi ne vidas vin.
- Sen dúvida, eu prefiro este.
  Sendube, mi preferas tiun.
- Além disso...
  Krom tio...
- A menos que tu não queiras.
  Escepte se vi ne volas.
- Compreende-me?
  Ĉu vi komprenas min?
- Que queres dizer?
  Kion vi volas diri?
- Desejas alguma coisa?
  Ĉu vi deziras ion?
- Que farias se estivesse no meu lugar?
  Kion vi farus estante en mia loko?
- Você não tem razão, você enganou-se.
  Vi ne pravas, vi trompiĝas.
- Graças a Deus, acabou!
  Dank' al Dio, finiĝis!

ATENTU !

ESPA-helpon!

Karaj gesamideanoj, ni devas sursûti la mondon per ESPERANTAĴOJ. Helpu nian societon. Tuj akiru kaj multe uzu E-presitajn kovertojn, en ESPA.

10-CZ$5,00 ; 50-CZ$20,00 ; 100-CZ$40,00

Horoskopo

21/6 a 21/7



Kankro

La kankranoj estas introspektivaj, timidaj, revemaj, ŝajnas al ni ĉiam eksteren de la mondo.

Ili estas tre rezervigemaj kaj pro tio estas ĉiam tre malfacila helpi ilin.

Ili sin turnas al si a krusto prudente ĉiam kiam li (ŝi) sentas dangeron en la etoso.

Bonŝanca numero - 2

Tago de la semajno - Lundo

Planedo - Luno

VERKITA DE "QUINO"

DIVENU...

Ĉu vi povas kredi ke ĉi tia simpatia knabineto estas nuntempe unu el la plej aktivaj esperantistinoj de nia urbo? Bonvolu, diveniku estas ŝi - kaj skribu al ni. Vi gajnos kiel premion Esperantan ĉemizon, se vi trafos.

Atentu:

La letero devos alveni nian sidejon ĝis la 25ª de julio.

K O N T A K T I L O

ESPA-Informilo
JUNHO/86

Korespond-adreso:
Rua dos Andradas, 1137/ 1704

Tel. :25.3941 - Centro

Porto Alegre - RS

CEP 90.000

Konkurs-Venkinto

Pro nia lasta Konkurso "Divenu..." publikigita sur Kontaktilo nº 2 amasoj de leteroj alvenis al nia redakcio. Tamen, laŭ la reguloj, oni premiu la unuan alvenintan leteron, kiu estis de sro. G.O.Vaske el S. S. do Kai. La foto estis de Silvia d'Avila Araujo je sia infaneco. Li ricevos la premion dum Verda-Kafo kunveno.